

Karolo Píĉ: P R I N T E M P A J B I L D O J

1

Grandurba trotuaro

Ŝi iras kaj ŝi ame revas
La vento ŝian jupon levas
Estas februaro

3

Kampanilo

La sunsubiro sangas
La anĝelus' klingklangas
Aprilo

2

Bulvardo

Karmine bruas ĉiuj tramoj
Knabinoj Knaboj Junaj amoj
Marto

4

Komenca gajo

Poste longega longa kis'
Ebria dolĉo Paradiz
Kaj majo

JAN AMOS KOMENSKÝ – COMENIUS – KAJ INTERNACIA LINGVO.

Antaŭ la dua mondmilito trovis profesoro Čyževskij en arkivo en Halle /Germanio/ nekonatan manuskripton de „PANGLOTTTIA“ /Ĉiolingvo/ de Jan Amos Komenský, parton, kiu estis ĝis tiam rigardata kiel perdita.

En tiu ĉi verko Comenius proponas du konkretajn specimenojn /grupojn/ de artefarita lingvo, ĉar li vida sen tiu menco solan solvon, meditante /ĉap. VI §§ 10 kaj 11/:

„Nek iu el la vivaj lingvoj, eĉ el tiuj plej kulturitaj, taŭgas. Ĉar al neniuj el ili mankas rekomendantoj, tial ni ne progresas sen envio, malpacoj kaj konfuzoj... kaj efektive ni havas neniun tute taŭgan. La itala, hispana, franca estas riveretoj el la lingvo latina... Nek angla... nek slava taŭgas por intencata celo universala.“

Por unua grupo de artefarita lingvo Comenius prenis la radián ekzemple de la verbo „esse“ – es. Comenius kunigas personan pronomon kun radiko „-es“ simile, kiel Zamenhof kun radiko „est“.

Zamenhof	Latino:	Comenius:
mi estas	ego sum	eges
ci estas	tu es	tues
li estas	ille est	illes
ni estas	nos sumus	noses
vi estas	vos estis	voses
ili estas	illi sunt	illies

Simile estas senutilaj finaĵoj por tempo estinta. Sufiĉas antaŭmeti signon de estinteco „ante“ /antaŭ/:

Zamenhof	Comenius:
mi estis	anteges
ci estis	anttues
li estis	antilles
ni estis	antnoses
vi estis	antvoses
ili estis	antillies

Analogie oni faros futuron per signo de estonteco „post“ /poste/: posteges, posttues, postilles, postnoses, postvoses, postillies. /Ĉu tio ne rememorigas Zamenhofajn prefiksojn!/?

Tute analogie oni povas simpligi deklinacion. Sufiĉas aldoni kazojn de pronomo al vortradikoj.

Pri adjektivoj ni citu Comenius /VIII, 6/: Ĉe la adjektivoj estas en plej multaj lingvoj diferenco laŭ la tri sekej malfacila; plej facila ĉe la germanoj, ĉiam per finaĵoj „-er, -e, -os“, ekzemple: ein guter Mann, eine gute Frau, ein gutes Kind. Sed eĉ tiuj ĉi finaĵoj estas forlasataj kiam antaŭiras difina artikolo der, die, das, ekzemple: der gute Mann, die gute Frau, das gute Kind. Ĉar la substantivoj ne havas sekson, ankaŭ adjektivoj ĝin ne havas. Kun unu kaj sama finaĵo ili estas metataj ne sole al ĉiu nomo /kiel en la latina: felix vir, -- femina, -- animal/, sed ankaŭ al ĉiu kazo. Kvazaŭ, se vi dirus latine: bon femina, bon animal, bon viro /dativo!/ bon virum ktp. Ĉar ĝi estas tre oportuna kaj forigas multajn malagrablaĵojn, ĝi meritas imiton.“

Por d u a g r u p o /specimeno/ de artefarita lingvo Comenius ne uzis latinan materialon, sed elektis ĝin laŭ aliaj principoj /apriore/.

Komparante la ideojn de Comenius kun tiuj aplikitaj de Zamenhof post pli ol 200 jaroj /!/, ni vidas, ke ambaŭ viroj elektis similan vojon de simpligo de gramatiko kaj eluzo de latindevena materialo.

Pro tio ŝajnas al ni ne ĝusta la konkludo de jam mortinta Josef Hendrich, profesoro de pedagogio en Karlouniversitato en Praha, emitenta fakulo pri Comenius, fine de lia ĉeĥa artikolo en la gazeto „Esperantista“ 1947 paĝo 50, el kiu ni ĉerpis, tradukita bonege de Dro Stanislav Kamarýt, kie Hendrich reduktas: „Hodiaŭ jam al neniuj venos ideoj, konstrui artefaritan lingvon laŭ skizoj de Comenius.“

Ni ne konsentas kun tiu ĉi konkludo, sed male: Laŭ nia opinio la strebado de Comenius kaj de Zamenhof pri la problemo de lingvo artefarita estas tute similaj, ĉar Dro Zamenhof post 2 jarcentoj plenumis la deziro de Comenius per sia „lingvo internacia“, kiel tion profetis jam Leibnitz dirante:

„Venos iam tempo, kiam aro da bonaj homoj vin kulturos, Comenius, viajn esperojn eĉ ankaŭ dezirojn!“

Dro Josef Fousek

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenos ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo. De la 19-a horo perfektiga kurso gvidata de s-ano A. Slanina.

JUNULARO de la Klubo kunvenas ĉiumarde en Praha 2, Krakovská 21, IIIa etaĝo je la 19-a horo.

Programo por marto – aprilo:

- 13.3. Josef KOŽENÝ /Kutná Hora/: Dormo kaj sonĝoj
- 20.3. Vladimír SLANÝ /Ostrava/: Nia movado en la regiono de Ostrava dum lastaj tri jardekoj
- 27.3. PhDr. Augustin PITLÍK /Praha/: Unuaj jaroj de la esperantista movado en Prago kaj en ĉeĥoslovakaj landoj
- 3.4. Josef VONDROUŠEK /Brno/: Ĉeĥa violonarto novtempa
- 10.4. Rudolf HROMADA /Praha/: En nia Klubo antaŭ kvindek jaroj
- 17.4. Ing. Ladislav KRAJÍC /Tábor/: Maŝinoj por mekanikado de torlaboroj /kun lumbildoj/.
- 20.4. ARTVESPERO DE VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY Henrik IBSEN: N O R A
- 21.4. Laborkunveno de la regiono Praha /9,30 horo, klubejo/
- 24.4. Miloš RUDOLF /Olomouc/: El prahistorio de l'homo /kun filmo/
- 8.5. Štěpán URBAN /Praha/: Aventuroj de la Spirito

SCIIGO DE LA PROGRAMGVIDANTO: Plurajn eminentajn prelegantojn aŭdis jam niaj klubanoj en la kadro de nia Popola Universitato. Multaj el ni volis pridemandi la prelegantojn – sed 22-a horo ne permesis tion, ĉar ni devis forlasi la salonon. Kaj tamen la problemo estas facile solvebla: komenco estas je la 20-a horo kaj ne duonhoron pli poste! Venu ĉiuj akurates, la programo same akurates komencos kaj restos tempo ankaŭ por amika interparolo kun niaj gastoj!

PLUA MONDSIGNIFA TEATRA KLASIKULO EN ESPERANTO SUR LA SCENEJO.

Post du originale verkitaj esperantaj teatraĵoj prezentos la Verda Ĉaro de Julio Baghy sabate la 20-an de aprilo 1957 sur la scenejo de Malá Scéna en Smečky tradukon de la plej kontata dramo de Henrik Ibsen: Nora /La hejmo de l' pupoj/. Tiu ĉi klasika teatraĵo de la mondsignifa teatra repertoaro, kies unua prezentado okazis antaŭ preskaŭ 70 jaroj, estas ankoraŭ hodiaŭ viva pro sia drameco de la unua leviĝo de l' kurteno, pro la brila dialogo kaj perfekte majstra pentro de la karakteroj. Ankaŭ ĝia problemo, akre kritikanta la tiaman burĝan societeton, havas ankoraŭ hodiaŭ multon por diri al la samtempa rigardanto.

En la traduko de Eva Seemannová prezentos la figurojn de tiu ĉi dramo: Seemannová, Řiháčková, Nývlťová, Drapáková, Seemann, Kalivoda kaj Tichý. La dramo estos prezentita sen adaptoj kaj mallongigoj. Studante tiun ĉi klasikan dramon, daŭrigas la Verda Ĉaro de Julio Baghy sian vojon al difinita celo: surscenigi esperantajn tradukojn de la plej signifaj verkoj el la teatra mondliteraturo.

TKKE: La 20-an de aprilo, honore al la Majstro, la Verda Ĉaro de J. Baghy prezentas mondfaman dramon de H. Ibsen Nora. Eluzante tiun ĉi faron en espero, ke multaj eksterĉefurbaj, gesamideanoj la prezentadon partoprenos, ni kunvokas por la dimanĉa antaŭtagmezo la 21-an de aprilo je la 9,30 horo LABORKUNSIDO DE ESPERANTISTOJ DE LA REGIONO PRAHA /ĉefpunktoj: Trarigardo de la enlanda kaj tutmonda movado – de Josef Vítek, Laboro de esp. junularo en ĈSR – de Jaroslav Mařík /en la klubejo en Smečky. Planata estas ankaŭ posttagmeza trarigardo de ĉefurbaj vidindaĵoj.

Rilate la tranokton en komuna tranoktejo anoncu vin /plej malfrue ĝis la 10-a de aprilo/ kaj sendu Kč 10 al s-ano Vladimír Novotný, Pol. věžňů 10, Praha 3 – restante. Hotelan tranokton devas ĉiu interesulo mem prizorgi. Ĉe s-ano Novotný estas ankaŭ mendeblaj enirbiletoj por NORA. Ne forgesu aldoni la necesan monsumon! Enirbiletoj estos pagitaj kaj restos sub via nomo ĉe la kaso. Indiku do precize la nomon por la enirbileto! Enirprezroj Kčs 4,3.

Sciigo de la administracio: Ankoraŭ tiun ĉi numeron ricevas ĉiuj laŭ la adresoj, kiujn ni ricevis de s-ano Burda. La venontan numeron ricevos nur tiuj, kiuj egaligis sian kluban membrecon aŭ sendis mondonacon, kiu kovras niajn elspezojn. Deziru poŝtpagilon de s-anino Anĉi Bárochová, Sokolská 17, Praha 2 – Nové Město.

--

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

GEEDZIĜOJ:

S-ano Stanislav KREJČÍK kaj Helena ANDREJKOVÁ geedziĝis. Ni deziras al nova esperantista paro nur feliĉon kaj kontentecon.

SKED

S-ano Zdeněk MIKYSKA kaj Zdena KYRLACHOVÁ geedziĝis la 2-an de marto 1957 en Lysá nad Labem. Al la simpatiaj novgeedzoj – niaj membroj – ni deziras feliĉon, daŭran vivprosperon kaj multajn esperantidoj!

Ankaŭ s-ano František ŠIMÁČEK, Debř 27, p. Josefův Důl perdis sian fraŭlecan liberech kaj edziĝis je samideanino (kies nomon ni bedaŭrinde ne kapalis malkovri), kiun li pasintjare trovis en SKED. Ankaŭ ili akceptu nian sinceran gratulon!

SKED

JUBILEOJ:

Jam la 18-an de decembro 1956 festis sesdekjariĝon simpatia kaj meritplena esperantisto Jan Ev. SLÁVEK en Praha. Pli ol 35 jarojn li estas esperantisto, ĉiam vigla dissemanto de niaj noblaj ideoj, estinta delegito de UEA en Týn n. Vlt. kaj jam 20 jarojn membro de nia Klubo. Li akceptu niajn bondeziresprimojn kaj certigon pri estimo al lia laboro.

EKP

JUNA SESDEKJARULO. La 1-an de februaro festis sian sesdekjariĝon fervora ano de E-rondeto kaj estinta prezidanto de la grupo en Košice, s-ano profesoro Inĝ. Jozef FISCHHOF. Multaj gesamideanoj, speciale tiuj el SKED, konas tiun ĉi gajon kaj humoron dissemantan bonkorulon. Ni sincere bondeziras okaze de lia jubileo!

SKED

Inĝ. Berthold GUTTMANN el Běhánky-Teplice, fervora esperantisto, festis 23-an de februaro 1957 sian 55-jariĝon kaj samtempe sian 35-jaran esperantistech. Al nia simpatia nelacigebla membro ni plej sincere gratulas!

EKP

MORTO:

Marie Kodydková mortis. Fratino de la prezidanto de TKKE Josef Vítek kaj patrino de nia membrino Ludmila Kodydková post pli ol trijara suferado forlasis la mondon en sia 56a vivjaro la 24-an de januaro 1957. Pluraj samideanoj en la vasta Esperantujo (Hans Jakov, Balkányi Pál, Józef Toczyski k. c.) per siaj medikamentalsendoj mildigis lastajn monatojn de tiu ĉi nobla virino, konata al sufiĉe multaj svedaj, danaj, nederlandaj kaj belgaj esperantisto jel persona kontakto. Virino, priskribita de Gösta Henriksson en lia libro „Per motorciklo en tri landoj“ ne plu vivas! Ŝi ripozu en paco kaj ŝiaj parencoj akceptu nian profundan kunsenton!

EKP

EL LA LETERO DE NIA MALPROSIMA MEMBRO MARIE GINZOVÁ:

En Kirjat Jan la unuan vintrotagon 21-an de dec. 1956

Karaj amikoj!

Kiam mi rigardas el la fenestro, mi apenaŭ povas kredi, ke venis jam la vintro, ĉar la naturo ekstere neniel similas vintron, al kiu mi estis kutima. Ĉar nun ofte pluvas, la temperaturo ja forte malaltiĝis, sed la naturo nun kvazaŭ ekspiris post la multmonataj ŭdaj varmegoj. Ĉio komencas verdiĝi, la burĝonoj malfermas sin kaj en iuj ĝardenoj la bedoj estas kovritaj per plej belaj floroj. La nun venontan sezonon ni ankoraŭ ne konas kaj niaj infanoj diras, ke nun estos la plej belaj monatoj de la jaro. Oni devas tamen esti iom pacienca kaj ne koleri la pluvegojn, kiam falas el ĉiele akvo kvazaŭ el poto. Tiam ne sufiĉas fenestroj, sed oni devas bone fermi ankaŭ la lignajn fenestrokovrilojn.

Praha-ek-1957-46-05

BULTENO PRAHA 46 1957

- 5 -

Kaj dum tia pluvo blovegas vento kaj ĉio ekstere flugas, kio ne estas bone fiksita. Oni eliras tiam nur en plej urĝa okazo kaj nepre necesas krom ĉio cetera ankaŭ altaj gumaj botoj, kiujn mi saĝe kunprenis, sed ne mia edzo. Oni ilin kompreneble povas ĉi tie aĉeti. Dum tiu pluvo ofte bele fulmas kaj tondras. Komence tio plaĉis al Tamar, sed nun ŝi lernis – eble de aliaj infanoj timi la bruon.

Dum ĉiu vetero kaj en ĉiu situacio mi ofte rememoras vin. Kun vera intereso mi legas viajn bultenojn, el kiuj mi ekscias pri via laboro, sukcesoj kaj malsukcesoj. Mi ĝojas, legante, kiel vi ĝuas viajn klubajn entreprenojn kaj la subite komenciĝintajn vizitojn de eksterlandaj samideanoj. Malproksima de vi, mi volas almenaŭ mense kun vi kontaktiĝi.

Mi esperas, ke eĉ vi ne forgesis min kaj mi volas al vi nun rakonti iom pri ni kaj pri nia nova hejmo. Ni loĝas en tute malgranda moderna domo, kies antaŭa parto, direktita al oriento, havas du malgradetajn fenestrojn, ĉar de tiu flanko venas tre forta suno kaj lumo, kiu ne estus eltenebla, se ĝi enirus tra fenestroj normalaj. Du ambaŭ flankoj estas ĝardeno, sed sole la antaŭa estas konvene kulturista. Tie estas herbo, floroj kaj du arboj por ornamo, la multe pli grandan ĝardenon maltantaŭ la domo oni povus pli ĝuste nomi sablaĵo kaj ĝi atendas ankoraŭ ies diligentajn manojn. Sur malgranda parto mi provis transplanti herbon el la ĝardeno antaŭa kaj mi brilo sukcesis. Mi tre emus labori en ĝardeno, sed miaj mastrumaj devoj ne permesas. Laboro estas de la frua mateno: ordigo, aĉetado, kuirado, lavado de vazaro, kudrno, sed ĉefe zorgo kaj laboro pri nia malgranda nepino Tamar elĉerpas min ofte ĝis ekstrema lacino. En plejparto de tiuj laboruj min mia edzo malmulte povas helpi. Tamar estas infano eksterordinare dolĉa kaj saĝa, sed oni havus sufiĉe da laboro, se oni okupiĝas pri ŝi. Hejme ŝi parolas ĉeĥe, sed iam ŝi uzas ankaŭ iujn slovakajn vortojn aŭ slovakajn finaĵojn /izba, já pŭjdem k. s./, ĉar ŝia patro estas slovako. En pleja proksimo ŝi havas tri kamaradinojn de proksimume sama aĝo – ŝi estos baldaŭ 2 kaj duonjara – kaj kun ili ŝi parolas hebree. Ili lernis de ŝi ankaŭ iomete ĉeĥe, uzas tiujn vortojn hejme kaj iliaj gepatroj ne komprenas ilin. Kun mia edzo ni interparolas ofte en Esperanto. Tiam komencas Tamar kutime krei /esperantlingve/: „Kion fari, kion fari?“ Tion ŝi iam aŭdis kaj tie al ŝi verŝajne plej plaĉis.

/daŭrigo/

- - -

Ekde 6-a de marto iama Orporta marbordo en okcidenta Afriko fariĝas sendependa ŝtato sub nomo GHANA /kvankam ĝi restas en kadro de britaj dominioj/.

M A L A P E R U !

Malaperu Marbordo portanta oron
rememoriganta nur singulton, ploron,
kaj tiu Marbordo sklava
siblas en vi svingo glava,
same Marbordo de l' pipro
klakas en ĝi vipa vibro,

eĉ Marbordo de l' eburo
troe rimas kun torturo,
kaj ceteraj dece nomitaj regionoj
kie ĝis nun ne povas vivi kiel homoj,
sole rajtas favan ekziston mizeregan
senpovaj fratoj de l' hero Kimathi Dedan^x.
Bonvenon, fine feliĉa Ghana.
Vin ĉiujn atendas rondo homa!

Kata kano

^x/Dedan Kimathi, gvidinto de Kenin liberbatalantoj, pendumita la 18-an de ĉijara februaro.

- - -

Por ĉiu akceptebla prezo mi netas malnovajn esperantaĵojn, precipe eldonaĵojn de Literatura Mondo /Ĉs. Antologio, verkoj de Kalocsay, Baghy/ kaj teatraĵojn /Goethe: Faŭsto kaj sim./ . Proponojn sendu al D-ro Ludoviko Izák, Gottwaldova 12, Martin /Slov./ Ĉeĥoslovakio.

- - -

Praha-ek-1957-46-06

BULTENO PRAHA 46 1957

- 6 -

TRADIČNÍ KURSY LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH 14.7. – 28.7. 1957.

V rámci kulturního plánu ODO a místní osvětové besedy v Doksech budou letos již po jedenácté uspořádány letní kurzy esperanta v Doksech u Máchova jezera ve dnech 14. – 28. 7. 1957. Dopoledne vyučování, odpoledne rekreace, večer kulturní a zábavné podniky. Nedělní společný zájezd. 50% sleva na dráze.

Budou otevřeny tyto kurzy:

- a) pro začátečníky
- b) pro pokročilé
- c) pro vyspělejší

Prospekty s přihláškami budou vydány do 15. dubna. Vyžádejte si je u Letní koleje esperanta v Doksech.

Zahajovací večer v neděli 14. července 1957 v domě osvěty.

Večírek na rozloučenou v sobotu 27. července 1957.

Plánovaný předpoklad většího počtu účastníků umožňuje podstatné snížení kolejního poplatku.

S ohledem na potřebu plynulého ročníku průběhu organizačních příprav je kolejné odstupňováno též podle přihlašovacích termínů. Aby byla umožněna účast v koleji zejména rodinným příslušníkům, kteří chtějí trávit dovolenou u Máchova jezera společně, je stanoveno pro ně zvláště nízké kolejné.

TABULKA KOLEJNÉHO LKED 1957.

Kursovne včetně vstupného na spol. a záb. Podniky, volné vstupenky k Máchovu jezeru, poplatku za odvoz zavazadel a ubytování

1) společné pro závazně přihlášené a plativší v termínech:

	1.	2.	3.	4.
	do 30.4.	do 31.5.	do 30.6.	později (bez záruky)
A – pro 1. člena rodiny	162,--	171,--	180,--	189,--
B – pro 2. člena rodiny	111,--	119,--	127,--	135,--
C – pro dalšího člena rodiny	87,--	94,--	101,--	108,--

D – pro dítě přihlášených rodičů

kurs nenavštěvující:

a) v dopol.opatrovnické péči

koleje	80,--	84,--	88,--	92,--
b) bez opatrovnické péče	60,--	63,--	66,--	69,--

2) v hotelu nebo soukromí pro závazně přihlášené a plativší v termínech:

	1. do 30.4.	2. do 31.5.	3. do 30.6.	4. později (bez záruky)
A – pro 1. člena rodiny	216,--	228,--	240,--	252,--
B – pro 2. člena rodiny	161,--	171,--	181,--	191,--
C – pro dalšího člena rodiny	133,--	141,--	149,--	157,--
D – pro dítě přihlášených rodičů kurs nenavštěvující:				
a) v dopol.opatrovnické péči				
koleje	120,--	126,--	132,--	138,--
b) bez opatrovnické péče	106,--	110,--	114,--	118,--

Účet u Státní spořitelny v Doksech č. 2240, číslo účtu u SBČs Doksy 237.002, směr.znak SBČs Doksy 0603-1.

-

Praha-ek-1957-46-07

BULTENO PRAHA 46 1957

- 7-

NI RECENZAS, KOMENTAS, LEGIS POR VI . . .

KON-TIKI REAPERIS EN SLOVAKIO. Al esperantistoj de nia ŝtato simpatie konata eldonejo slovaka OSVETA, n. o. en Martin reeldonis KON-TIKI en la traduko de Ed. V. Tvarožek el Esperanto. La unua eldono estis elĉerpita dum tri semajnoj kaj vane interesiĝis pri tiu mirinde interesa libro. Tial la eldonejo pligrandigis la eldonkvanton ĉe la dua eldono kaj tradukinto aldonis plurajn rimarkidaĵojn, kiuj plialtigas la valoun de la libro aperanta ankaŭ en nova koperto de Jozef Kunik. Ni ĉiuj aĉetu la libron aŭ en niaj respektivaj librovendejoj aŭ rekte en Slovenská kniha, Václavské nám. Praha 2, sed tute certe ni ĉiuj individue esprimu niajn dankojn al la supre menciita eldonejo. Niaj dankesprimoj estas sugestoj por la eldonejo la alifoja simila paŝo. Adreso: Vydavatel'stvo Osveta, Martin.

-jelĉ-

LA NICA LITERATURA REVUO, 2-a numero /nov.-dec.1956/ abundas je altkvalita legato, kiu nepre kontentigas ĉiun literaturamanton. Ĉeĥa leganto kun ĝojo tralegos ankaŭ la perfektan tradukon /Miloš Lukáš/ de „Vojaĝaj komizoj kaj asekuraj agentoj“ de Karel Poláček, viktimo de Oswiecim.

BABIĈKA de Božena Němcová en japana lingvo. En unuaj februaraj tagoj atingis nin sendaĵo vere tre agrabla: 130-a volumo de „Geknaba Biblioteko“ AVINETO de fama ĉeĥa verkistino Božena Němcová en la traduko de Kei Kurisu. Tiun ĉi juvelon eldonis en decembro 1956 eldonejo Iwanami. Samideano Kurisu uzis por la traduko rekte la ĉeĥan originalon kaj ankaŭ la esperantan tradukon de Vl. Tobek kaj K. Procházká. 400 paĝoj de lukse bandita libro enhavas multajn originalajn ilustraĵojn de Adolf Kašpar. La tradukinto kaj la eldonejo Iwanami akceptu niajn sincerajn dankojn kaj varmajn gratulojn.

EKSTERLANDAJ LEGANTOJ ATENTU!

ĈU NI TROVOS MINIMUME 3000 INTERESULOJN PRI GRANDFORMATA ESPERANTA GAZETO KIEL IAMA „ESPERANTO SERVO“, KIU POVUS APERI EN ĈEĤOSLOVAKIO DUFOJE MONATE? NENIU ABONPREZO, EL PAGIPOVAJ LANDOJ NI AKCEPTOS NUR ĈIUSPECAJN ESPERANTAĴOJN

KONTRAŬVALORE, EL NEPAGIPOVAJ LANDOJ NI ATENDOS ĜIS SIMILO ESTOS EBLA. VOLONTE NI AKCEPTOS ANKAŬ AMASABONLISTON! SKRIBU PRI VIA INDIVIDUA AŬ KOLEKTIVA INTERESO **TUJ** AL LA ADRESO: JOŬKO STANĚK, ĵurnalisto, Osadní 45, Praha 7 – Holešovice, ĈSR.

En decembra gazeto 1956 de la gazeto „World Student News“ eldonata pere de Studenta Internacia Unuiĝa en 8 lingvoj (angla, araba, franca, germana, hispana, itala, norvega kaj rusa) aperis tutpaĝa artikolo „Lernu Esperanton por Festivalo“ (en Moskvo) pere de Ronald Lynn. Krom rekomendoj de Esepranto kiel facilega interkomunikigilo estas menciita originalo ekscerpto de Zamenhofa parolo dum la Tria Universala kongreso de Esperanto en Kembriĝo en 1907.

Viaj opiniojn kaj spertojn tiurilatajn sendu al redaktejo de World Student News, Vocelova 3, Praha 12. Precipe gravas vpoj studentaj. Menciindaj niaopinie ĉi tiuj avantaĝoj post enkonduko de Esperanto: eblece studii u ajn universitato sen lingvaj malfacilaĵoj (sperte kaj opinioj de studentoj lernantaj fremdlande serĉataj kaj petataj): kongresoj, konferencoj kaj diskutoj de sciencistoj kaj studentoj je pli alta nivelo (sen enuiga tradukado); pli larĝaj kaj malpli multekostaj edicioj de sciencaj verkoj mondiskalo; direktaj paroloj kaj klarigo de vidpunktoj; pli bona kaj pli facila interkompreniĝado ktp., ktp.

-kst-

ESPERANTO EN SLOVAKIO estas nova multobligita periodaĵo eldonata de Esper. rondeto en Martin. Ĝia Janusa same kiel la februara estas agrabla surprizo. Enhavo informa kaj literatura en perfekta lingvo certe pliriĉigos nian movadon en la tuta ŝtato. La redakcia rondo, kiun gvidas prezidanto de Slovaka sekcio de TKKE s-ano Ed. V. Tvarožek, promesas eldoni 10 numerojn dum la kuranta jaro. Interesuloj mendu poŝtpagilon kaj alsendu 10 Kĉs al la adreso ESPERANTO, poŝt. prieĉinok C2, Martin.

JAPANA SEKCIO DE MEM ĉe KLEG, Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodo-ku, OSAKA, Japanio, proponas vastan interŝanĝon de filmstrioj por magia lanterno. Gravaj interesuloj nepre kontaktigu laŭ la supra adreso kaj deziru katalogojn. Ni varme rekomendas.

TKKE

Dum lastaj monatoj en ĉeĥaj gazetoj /9.12.1956 Obrana lidu, 7.2.1957 Květy/ ni povis legi pri INTERHELPO okaze de siatempa koloniigo de Kirgiza teritorio de Sovetunio. Kvankam ambaŭ raportoj estas seriozaj, mirigas nin, ke en Obrana lidu Interhelpo estas klarigita kiel vorto en Ido (perfektigita Esperanto!) kaj en Květy la vorto Interhlepo estas Nagoje menciata sen klarigo de ĝia ĉeĥa ekvivalento.

Libro Bookmen's Bedlam, An Olio of Literary Oddities, New Brunswick, Rutgers University Press 1955, enhavas interalie eĉ menciojn pri kelkaj malmulte konataj lingvoj artefaritaj kiel Orba (1893), Veltparl (1896), Europal (1911) kaj konstatas, ke sume ekzistas 200 similaj projektoj. Krom tio oni asertas, ke Esperanta bibliografio nombras proksimume 700 titolojn kaj laŭnome estas cititaj kelkaj klasikaj verkoj tradukitaj Esperanten k. ekz. kvar dramoj de Shakespeare, Ifigenio sur Taŭrido, Natan la Saĝulo, Sinjoro Tadeo, ktp.

Laŭ artikoloj „Frenezulejo de bibliofiloj“ pĝ 255 en kvina numero de „Světová literatura“ 1956.

kst

Informojn pri renevido de TEĴA el decembra numero de kvinlingva „Demokrata ĵurnalisto“ reprenis eĉ landa asocia gazeto „Československý novinář“ (Ĉeĥoslovaka ĵurnalisto) en Janusa numero.

JE MEMORO DE NACIA ARTISTO PROF. JOSEF SKUPA:

Karel Balák: Forŝirita fadeno....

Forŝirita fadeno marioneta,

Kliniĝis kapo al brusto eta...

Kia de l' malvarma mateno alporto

dum blanka tago staras ĉe pordo?

Orfana subite vojo de la rido,
ĉe ĉies koro sento de frido
kaj poste multaj larĝaj larmoj de veo
kvazaŭ sin lavus per pluv' herbejo.

Ni tiom Tristan. Kompreno kaj ne miru!
Floris rozoj sub ties ridete!
Kiu nur nun ripari scipovos, diru,
la fadenon de l' marioneto?

Vivo bela. Kial do forprenas oni
de homo, kion li ŝatas vere,
kaj homon, kiu kapalis disdoni
belon milopan tiel sincere?

LP esperantigis kata kano

ESPERANTO KIEL MEZURILO EN TELEFONA TEKNIKO

Telefonaj aparatoj respektive telefonaj sistemoj povas esti komparataj kaj kvalifikataj helpe de nombro de necesaj ripetoj eldevigitaj pro nekomprenebleco. En landoj kun nu runu lingvo parolata oni tiucele povas uzi normalan konversacion. Ekz. en Usono la mezuro estas la nombro de nekompreneblaĵoj okazitaj dum 100 sekundoj.

La internacia konsilantaro telefona CCIF (Comité consultatif interantional téléphonique) en Ĝenevo memkompreneble ne povis akcepti tiun ĉi manieron, ĉar tra eŭropaj retoj oni parolas diverslingve kaj la lingvoj eĉ ne ĉiam estas gepatraj lingvoj de la parolantoj kaj ofte okazas nekompreneblaĵoj pro aliaj kaŭzoj ol teknikaj difektoj de la sistemo. Tial CCIF akceptis kiel mezuron por kvalifikado la principon de sona komprenebleco kaj decidis uzi kiel mezurajn lilon (nomataj den la interkomunika elektrotekniko „logatomoj“) e s p e r a n t a j n vorterojn. Ili konsistas el konsonanto aŭ grupo da konsonantoj en la komenco, el vokalo aŭ grupo da vokaloj en la mezo kaj el konsonanto aŭ grupo la konsonantoj en la fino. Tiu ĉi maniero de kvalifiko kondukt al numeraj rezultoj kun pli malmulta difuzo, ol uzante la manieron de la silaba, vorta aŭ fraza komprenebleco.

-bra

(„Slaboproudý Obzor“, no 11 de novembro 1956).

MORTO DE OCCIDENTAL? La okcidentalista movado, kiu siatempe faris tiom da bruo per sia kontraŭesperanta propagando, ŝajnas alveni al la fino de sia 35-jara vegetado; en lastaj monatoj transiris la plej gravaj funkciuloj de Occidental-movado al Interlingua. Nun komencas antaŭmorta agonio. Kiom da mono, energio kaj tempo perdita!

ESPERANTSKÝ KROUŽEK VDOMU ARMÁDY V HRADCI KRÁLOVÉ si Vás dovoluje pozvat na CYKLUS PŘEDNÁŠEK pořádaných členy kroužku v Domě armády od 18. do 22. 3. 1957, vždy od 19.30 h.

Pondělí 18. 3. Jar. Dolanský: Problém mezinárodního jazyka a esperanto

Úterý 19. 3. Fr. Šmíd: Zážitky esperantisty ze Sovětského svazu (s diapozitivy)

Středa 20. 3. Alfred Weiner: Dr. L. L. Zamenhof, jeho život a dílo.

Čtvrtek 21. 3. Miloš Lukáš: Jak esperanto pomáhá při studiu cizích jazyků a jak šíříme naši literaturu ve světě

Pátek 22. 3. Zd. Hršel: Hirošima – a esperanto v japonském boji za mír

Sobota 23. 3. Přátelský večer účastníků cyklu přednášek v Autoklubu Grandhotelu Bystrica. Začátek ve 20 h.

Neděle 24. 3. PRACOVNÍ KONFERENCE ESPERANTISTŮ z Hradeckého, Pardubického a Libereckého kraje. Začátek v 9.h

Sleva na železnici 50%. Přihlášky na ubytování ve společné noclehárně, v hotelu, v soukromí, s udáním nástupní železniční stanic přijímá M. Hromas, Myslivečkova ul., Hradec Králové III.

AL ESP. PACDEFENDANTOJ! Bedaŭrinde la politikaj okazintaĵoj kaj pluaj malhelpoj en Polio kaŭzis, ke la decembra pola eldono de „PACO“ atingis vin kun granda malfruiĝo. La kulpo estas nek ĉe ni, nek ĉe niaj polaj gekamaradoj. La Janusa sveda eldono, kiu estas jam komence de januaro forsendita al ĈSR, ĝis nun ne atingis nian MEM-poranton. Verŝajne ĝi kuŝas ie ĉe la poŝto aŭ ĉe la preskontrolo. Ni ĵus esploras ĉi aferon kaj esperas trovi baldaŭ solvon. Bonvolu pacienci kaj pardoni.

R. Burda

Libro Bookmen's Bedlam, An Olio of Literary Oddities, New Brunswick, Rutgers University Press 1955, enhavas interalie eĉ menciojn pri kelkaj malmulte konataj lingvoj artefaritaj kiel Orba (1893), Veltparl (1896), Europal (1911) kaj konstatas, ke sume ekzistas 200 similaj projektoj. Krom tio oni asertas, ke Esperanta bibliografio nombras proksimume 700 titolojn kaj laŭnome estas cititaj kelkaj klasikaj verkoj tradukitaj Esperanten k. ekz. kvar dramoj de Shakespeare, Ifigenio sur Taŭrido, Natan la Saĝulo, Sinjoro Tadeo, ktp.

Laŭ artikoloj „Frenezulejo de bibliofiloj“ pĝ 255 en kvina numero de „Světová literatura“ 1956.

kst

GEOGRAFIA REVUO. Malgraŭ plurfoja Uligo s-ano Inĝ. Štefan Veselý en Martin – ĝia peranto en ĈSR – ricevis el Jugoslavio nenian sendaĵon. Ni petas la interesulojn, ke ili ne reklamaciuj ĝin ĉe la peranto. Se la peranto sukcesos ricevi la revuon, li tuj sendos ĝis nun aperitajn n-rojn al ĉiuj, kiuj jam aliĝis.

LA GLUMARK-KOLEKTANTO, nr-o 3/12 sept.-decembro 1956, oficiala organo de EKIK /Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Kubo/ - faka informilo, kiun ni rekomendas al ĉiu kolektanto de esp. glumarkoj, poŝtmarkoj ktp. Ĉar la bela senerara multobligita bulteno ne estas libere abonebla, ni rekomendas la membrecon en EKIK. Ĉefdelegito por ĈSR: Dolfa Bartošík, Na Černém vrchu 31, Praha XVI – Smíchov.

Lasta numero de NIA VOĈETO /96 str. de Habécor, NANCY, Francio/ porinfana belega multobligita informilo kun beletaj bildoj havas tre interesan enhavon: 3a geknaba kongreso en Beogrado, La kongresa filmo, Inganoj priskribas birdojn, Pionira urbeto apud Beogrado, Konkursoj ktp. Bedaŭrinde, ke tiu ĉi periodaĵo ne estas abonebla en nia lando, ĉar certe ĝi atingu merititan atenton ĉe niaj plej junaj adeptoj.

EL LA MOVADO DE NIAJ NAJBAROJ KAJ AMIKOJ

Bulgario: Urba komunuma entrepreno „Vsetrani uslugi“ organizis korespondan Esperanto-kurson. Per ĝi komencis lerni Esperanton pli ol 500 personoj, precipe en vilaĝoj. Bulgaraj ĵurnaloj kaj radio ofte propagandas la kurson. Preskaŭ ĉiuj bulgaroj jam scias kio estas Esperanto. – En Bulgara Ministeria Konsilantaro estas malfermita Esp-kurso. – En Sofia Fervojistia lernejo komencis lerni Esperanton 300 gejunuloj. – Bulgara poŝta administracio laŭ propono de CK de Bulg. Esperanto-Asocio planas la eldonadon de jubilea Esperanto-poŝtmarko. Ĝia eldonkvanto multe dependas de la intereso, kiun montros esperantistoj. Adreso: Ministerio de Poŝtoj, fako „Novaj poŝtmarkoj“ Sofia. – Esp. Societo „ALBATRO“ en Varna malfermis librovendejon. Krom esperantaĵojn oni vendas ankaŭ aliajn varojn. – Ŝtata eldonejo „Narodna Kultura“ presos en Esperanto la romanon „Sub la jugo“. – Antaŭ ses jaroj Radio Sofia ĉiutage dissendis en Esperanto novaĵojn pri la lando kaj kulturo. Oni denove disaŭdigis en Esperanto, se estos intereso pri tiaj dissendoj. Utilos leteroj sendataj al Radio Sofia kaj al Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, Sofia. – Esp. Societo „Maksim Gorki“ en Sofia en 1956 havis 228 membrojn. En ĝia kadro funkcias jenaj sekcioj: instruista, ĵurnalista, fervojista, junulara, studenta. Kunvenoj okazas ĉiusemajne. La jarkunveno ĉeestis 188 membroj. En Sofia funkcias ankaŭ fervojista societo kun 76 membroj kaj blindula kun 22 membroj. Sofia societo: M. Gorki: nun havas novan adreson: Poŝtkesto 44, Sofia

Nikolaj Nikolov

Vid. de Informado kaj dokumentado de BEA

„NARODNA MLADÉŽ“ organo de bulgara Junularkomitato /n-ro 23 la 27-an de januaro 1957/ alportas dukolonan longan artikolon pri Esperanto ĝenerale kaj ĝia uzo dum la Mondfestivalo en Moskvo. Aŭtoro N. Nikolov funkcias kiel esp. junulara gvidanto por la Moskva festivalo. Bedaŭrinde niaj klopodoj tiurilate restis tute seneĥaj.

Ĉe BEA fondita Kino-sekcio, kiu membras kinoreĝisorojn, scenaristojn, filmoperatorojn kaj aliajn laboristojn ĉe la Direkcio de la Kinematografio en Bulgario, volas kontaktiĝi kun samideanoj-kinolaboristoj en ĉiuj landoj. Sekretario: Georgi Stojanov-Biger, str. Grivica 7, Sofia.

La tuta eldonkvanto de „Nuntempa Bulgario“ elĉerpita! La nura eldonkvanto 4000 ekzempleroj tute ne sufiĉas, ĉar venis amasaj abonuj el plej diversaj landoj, ĉefe el Sovetunio.

El BULTENO de BEA kaj de Bulgara Esperantista Kooperativo: LA BULGARA AKADEMIO DE LA SCIENCIOJ APOGAS ESPERANTON. En la laetero/Nro B-V-104 de 27a de decembro 1956 /Instituto pri Bulgara Lingvo anoncas al la Prezidantaro de la Bulgara Akademio de la Sciencoj: Inter la bulgaraj lingvistoj oni konsideras, ke Esperanto hodiaŭ estas la sola inter la proponataj internaciaj artefaritaj lingvoj, kiu sukcesis stabiliĝi kaj havi adeptojn. Esperanto estas facila lingvo: ĝi estas lernebla en multe pli mallonga tempo ol iu ajn alia lingvo; krome, ĝi povas esti konsiderata kiel lingvo de la progresema homaro. Antaŭ nelonge en USSR oni formis komitaton de iamaj sovetaj lingvistoj por akceli la studadon de Esperanto. OK de la Bulgara Komunista Partio havas pozitivan rilaton al ĝi. Oni devas akceli la studado de Esperanto en nia lando. Direktoro: Akademiano Vladimir Georgiev.

En la letero de la Akademio al Bulgara Esperantista Asocio /Nro R-18-135 de la 7-a de januaro 1957/ oni aldonas ankoraŭ la frazon: La saman opinion havas ankaŭ la Prezidanto de la Akademio – Akademiano Todor Pavlov.

Subskribita konstanto de la Prezidanto: D-ro Popov.

ĈINIO: Laŭ la sciigo de Ĉina Esperanto-Ligo en decembro 1956 ekfunkciis oficejo de la Ligo havanta nun 5 pagitajn oficistojn. En preparo por la preso estas nova lernolibro, por kiu modele servas nia lernolibro de prof. Th. Kilian.

Laŭ la raporto de Lic. Tibor Sekelj el Ŝanhajo (16.1.1957): post Unesko-konferenco en Delhi li akceptis inviton viziti Ĉinion kaj kiel interpretisto li ĉirkaŭvojaĝis la vastan landon propagandante Esperanton. Ekde februaro li denove reiris al Hindujo por daŭrigi komencitan poresperantan laboron.

HUNGARLANDO: Post kelkmonata paŭzo la 20-an de januaro denove kunvenis en la V-a distrikta kulturdomo la budapesta „Paco Esperanto-Fakrondo“. S-ino Kenesei raportis pri la laboro de la helpkomitato favore al tiuj gesamideanoj, kiuj suferis domaĝon, perdan dum la bedaŭrindaj okazintaĵoj kaj kiuj ekonomie bezonas helpon pro diversaj mankoj. S-anoj Baghy kaj Márton raportis pri siaj vojaĝoj en Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, kie en multaj lokoj ili havis sukcesajn prelegojn kaj prezentis la esperante parolatajn du hungarajn kulturfilmojn. Ili sperte la bonan organizon, oferemon kaj ageman laboron de la grandnombra serioza esperantistaro en tiuj landoj. Baghy deklaris, ke la hungara movado devas ankaŭ baziĝi sur la kulturlaboro per konigi la hungaran kulturon eksterlande kaj konatiĝi kun alilandaj kulturo. S-ano Márton raportis pri la kulturkontaktoj inter la hungaraj kaj tieaj movadoj, precipe pri reciprokaj vizitoj, prelegvojaĝoj, gastludoj de La „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ kaj de pola virina trio ĉe la Landa Esperanto-Kongreso projektil por somero 1957 en Budapeŝt. La budapeŝta rondo daŭrigos siajn kunvenojn-malgraŭ nehejtado-regule ĉiujaŭde posttagmeze. Kelkaj provincaj rondoj jam ankaŭ laboras. La Blindula Asocio esperantlingve kontaktiĝis kun alilandaj blindulsocietoj, kiuj promesis jam sendi helppakaĵojn por hungaraj blinduloj. La Asocio nun eldonas ŝtatkoste blindulajn esperanto-lernolibron kaj vortareton. En budapeŝta ĵurnalo aperis raporto pri projektoj de la Lernolibro Eldona Entrepreno. Inter la eldonetaĵoj estas ankaŭ esperanto-lernolibro. La Pedagogia Sindikato daŭrigos en la ĉefurbo de la esperanto-kurson de prof. Pechán, iu kun s-ano Baghy kaj aliaj preparas noveldonon de vortaro. Malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj estas kreata serioza movado en tiu multe suferinta lando. Reorganiziĝas jam kelkaj fakgrupoj: fervojista, pedagoga, tramista kaj junulara. La pluan vigliĝon kaj seriozecon de la movado pruĉas, ke la radio en la ĉefurbo la 24-an de januaro publikigis la laborplanon de la Landa Esperanto-Konsilantaro okaze de la 70jara jubileo de la apero de la unua Esperanto-lernolibro. Oni pritraktas la eldonon de poŝtmarkoj, oni deziras aranĝi somere konkorde kun la koncernaj instancoj la II-an Konferencon de la Mondpaca Esperantista Movado.

La nuntempaj novaj ĵurnaloj ankaŭ raportis pri tiuj kunvenoj kaj laboroj (Esti Hirlap, Népakarat) kaj la 1-an de februaro la ĉefa partia ĵurnalo enhavis sciigon, ke la II-a hungara radiostacio (Petöfi) post refunkciado enprogramigos ankaŭ esperantlingvajn sciigojn. Sed necesas, ke multaj skribu al Radio Budapest esprimante simpation kaj interesigon por la hungara popolo, petante sciigojn raportojn pri vivo, progreso kaj kulturo de la hungaroj! Ne prokrastu tion! Ankaŭ provincaj gazetoj (Hajdu-Biharmegyei Néplap, Békésmegyei Népujság) enhavis sciigojn pri la esp. laboro. Kursoj estas denove en la urboj Békescsaba, Miskolc, Szeged. La lernantoj en multaj lernejoj povas laŭ pli frua dekreto elekti inter la fremdlingvoj ankaŭ Esperanton. Ni scias pri tia elekto nur en unu lernejo de urbo Makó. Bedaŭrinde mankas lokaj lingvosciaj instruistoj por efektiviigi grandskalo tiun eblecon. Instrui povas nur tiu, kiu apartenas mem al la koncerna lernejo.

LP

Balkányi Pál, Budapest

POLLANDO: La Asocio mem disvendis pasintjare ĉirkaŭ 25000 ekz. de div. eldonaĵoj. Ĝus aperas belege bandita tri-voluma FARAONO, preparata estas lernolibro de fratoj Fethke, reeldonota estos vortaroj de Zawada kaj Guterman, la revuo „Pollando“ aperos ĉiumonate, verŝajne nunjare aperos „Quo Vadis“ de Sienkiewicz, „Medalionoj“ de Nałkowska, „Novelaro“ de polaj nuntempaj verkistoj.

Krakovo en decembro festis 50-jaran de Esp. movado dum granda solenaĵo en salono de l' Akademio de Belartoj. Parton de la jubileo disaŭdigis Pola radio. Orjubileajn insignojn kvar krakovaj pioniroj: Z. Klemensiewicz, J. Kriss, St. Rudnicki kaj K. Walter. Krom ili same honorigita estis kara gasto Julio Baghy. Honore al L. L. Zamenhof Urba Konsilantaro enmurigis kaj malkovris novan platon ĉe strato Zamenhof. Granda esperantaĵ-ekspozicio en ĉambrego de Klubo de Internacia Gazetaro kaj Libro altiris gravan atenton de neesperantista publiko.

En la lando ekzistas 25 filioj de la Asocio. La 8-an de novembro estis restarigita tiu en la ĉefurbo Varsovio. – Vigla kaj grandskala movado kun multnombro vizitataj kursoj montriĝas sub gvido de prof. Józef Toczyński en la regiono de Gdańsk.

RUMANIO: La 26-an de decembro 1956 okazis en Bukureŝti speciala kunveno, kiam formiĝis la tutŝtata komitato de la rumana esperantista movado, sub la nomo de „Iniciata Komitato por Esperanto“ de la Rumana Popola Respubliko. La tuja tasko de tiu ĉi komitato estas ravigligi kaj reorganizi la rumanan esperantistan movadon. La adreso estas: „Esperanto“, poŝtkesto nr. 205, Bukureŝti, Rumanio. La eksterlandaj esperantistaj organizoj kaj revuoj estas potataj sendi korespondaĵon, revuojn kaj informojn laŭ la indikata adreso.

SOVETUNIO: „Bloknotlibro de Agitatoro“ (Nro 1, januaro 1957, Leningrad), ruslingva organo de Leningradaj regiona kaj urba komitatoj de la Kompartio de USSR enhavas tre gravan artikolon de leningrada lingvoscienculo N. D. Andreev: Esperanto-ligvo de amikeco kaj paco. Favora 8-paĝa artikolo certe grave influos la porpacan laboron de esperantistoj ne nur en USSR, sed ankaŭ en ceteraj popoldemokratioj, kiel grava dokumento de la starpunkto de la Kompartio en USSR.

--

„Voprosy jazkoznanija, nro 6/1956 sur paĝoj 65-78 enhavas artikolon „Pri internacia helplingvo“ de doktoro Bokarev kaj Andrejeva laŭ science prelego en Lingvosciencia instituto de la Akademio de sciencoj de USSR. Tiu ĉi grava artikolo denove dokumentas la dvoran sintenon de sovetiaj sciencistoj rilate Esperanton.

--

Tre volonte ni informuj nian legantaron pli vaste pri la movado, tiel grandskala, sed mankas al ni koncernaj informoj. Tial ni petas niajn amikojn en USSR informi nin kaj efendi ĉiun presmaterialon, gazetou, afiŝojn ktp.

Karaj ĉeĥoslovakaj kamaradoj! Konstante plifortiĝas amikeca kontakto inter la du fratpopoloj ĉeĥoslovakaj kaj sovjetaj. Ĉi kontakton partoprenas ankaŭ ni, nordanoj. Rigardu la geografian karton! Certe vi trovos nian urbon Archangelsk. Ĝi kuŝas apud la bordo de la Blanka Maro. Ĝiaj marvojoj etendiĝas al la Glacia Oceano-vastega akvujo. Nia nordlando estas arbar-industria kaj en nia urbo funkcias multaj seĝfabrikaj. Ĝojo niaj seĝistoj ricevis respondecan mendon, ŝarĝi sur relvojan vagonaron ligraĵojn (tabulojn) por Ĉeĥoslovaka respubliko. Dum unuaj tagoj de tiu ĉi jaro niaj seĝlaboristoj sendis al Ĉeĥoslovakio pli ol 2000 kubometrojn da tabuloj. Ni, sovjetanoj ĝojas, povante partopreni la potencon konstradon de via lando. Ni petas vin transdoni nian leteron al tiu laborista kolektivo aŭ konstruaĵo, kiu ricevis la lignaĵon el nia urbo. Ni deziras ricvi leterojn por niaj arbar- kaj lignaĵ- laboristoj pri la kvalito de la tabuloj ktp. Sincere via Molcdeĵnij Klub, Gorkon VLKSM, ARCHANGELSK, Sovjet-Unio.

LP

VIETNAMIO: Vietnama Esperanto-lernolibro, 82paĝa formato 14x22, belaspekta dukolora kovrilo kun portreto de L. L. Zamenhof, memskribaĵo de prezidanto Maa-ce-tung rekomendanta lernadon de Esperanto, paroloj de Karl Marks, Lenin, Tito, Gorkij, Lu-Sin pri Esp-o, kun adresaro de esp-istoj el 9 landoj. Bona materialo por Esperanto-ekspozicioj. Prezo: 10 int. resp. kuponoj aŭ samvalora Esp. literaturo, insignoj ktp. Mendebila ĉe: K-do Dao Anh KKA, Bao Nhan Dăn, HANOI, Vietnamio.

LP

La duonsemajna grandformata gazeto TIẾŢ PHONG (Avangardo), centra organo de Vietnama laborista junularo, kiu havas eldonkvanton de 10000 ekz. publikigis en sia nro de 20. 11. 1056 pli ol kvaronpaĝan artikolon sub titolo „Kio estas la internacia lingvo Esperanto?“ En la artikolo nia k-do BaŭAnh Kha el Hanoi detale klarigas ĉi aferon kaj montras la altan valoun de Esperanto al la vietnama junularo. Cetere jam pluaj gazetoj favore raportis pri Esperanto kaj la rezultoj de tie jam montriĝas en diversaj lokoj de Vietnamio.

LP

Lastatempe la Vietnamia MEM-sekcio vigle laboras kaj atingis multajn sukcesojn. Ĝi estas probita de la registaro kaj havas kiel honorajn prezidantojn, ministron de klerigado kaj ministron de kulturo. La sekcio organizis prelegojn en pluraj mezgradaj lernejoj kaj ĝuas la aprobon de la junulara kaj studenta asociuj. Jam funkcias en Hanoi 5 kursoj kun ĉirkaŭ 400 gelernantoj. Ĝis nun pli ol 3000 personoj ĉeestis la prelegojn de la sekcio. Gejunuloj, kiuj partoprenos la VI. Festivalon en Moskvo diligente lernas Esperanton.

LP

N. V. Kinh, Hanoi

Adresŝanĝo: bonvolu noti, ke la MEM-peranto por la Vietnamia Dem. Respubliko, k-do Nguyen Van KINH el Hanoi transloĝis per longa tempo al Moskvo, kie li havas gravan postenon. Lia nova adreso estas: K-do Nguyen Van KINH, ĉe Ambasadorejo de Demokrata Respubliko Vietnamia, MOSKVA, Sovjet-Unio.

Anstataŭanto kaj peranto de MEM por Vietnamio estas nun: K-do Dao Anh KHA, Esperanto-Bás Nhãn-Dăn, Hanoi, Vietnamio.

LP

EN LA JUBILEA 70-A JARO DE EKZISTO DE ESPERANTO TKKE ELDONOS:

1. lernolibron de Esperanto de Th. Kilian – aperos en oktobro.
2. vortaron esp.-ĉeĥan de Jan Filip – aperos en novembro.
3. kolekton de fotografaĵoj de Ĉeĥoslovakio kun esp. teksto, kiu enhavos 12 belegajn bildojn de

Praha, Karlovy Vary, Doksy, Gigantmontaro, Brno, Olomouc, Ostrava, Moravia Slovakio, Bratislava, Košice, Altaj Fatroj kaj de slovaka folkloro motivo - aperos en septembro

4. diverskolorajn glumarkojn – aperos en aprilo-majo,
5. korespondkarton,
6. leterpaperojn kun kovertoj,
7. insignojn.

Bonvolu ne fari antaŭmendojn! Ĝustatempe ni anoncas necesajn detalojn.

- - -

ESPERANTISTA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Brandýs nad Labem:

s-ano prof. Václav Brožík post bele aranĝita ekspozicio fondis en sia dekunujara mezlernejo esp. interesrondeton, kiun partoprenas 25 gelernantoj. Direktoro de la lernejo, estinta esperantisto, favoras la laboron de nia samideano, kiu instruas esperanton laŭ la lernolibro de Th. Kilian.

Brno:

Laŭ la program opor januaro-aprilo 1957 Esperantista rondeto ĉe Urba kleriga kunularo aranĝis en la tagoj 19.-24. de februaro seminarion de Esperanto kun jam tradicia maskovalo kaj konferenco de la Junularo. Raporton alportos la organo de TKKE-Junularo la Tagiĝo. Kurso por junularo – 65 partoprenantoj.

Doksy:

En oktobro komencita kurso finis kun 23 absolventoj, kiuj akceptis la proponon fondi esperantistan interesrondeton ĉe la Kulturdomo ekde la 1-a de januaro 1957. Rondeton estras s-ano Václav Špůr. Ni bonvenigas nian novan rondeton kaj deziras bonan prosperon!

Dubá:

Post finita kurso 12 partoprenintoj fondis en januaro nunjara esper. rondeton ĉe Uzina Klubo de n.e. Elite. Prezidanto Václav Blažek, Dubá 272, sekretario kaj kasistino s-anino Milena Laudová, lingve gvidas la rondeton instruistoj Jaroslav Havlíček kaj Josef Antala. La lasta trasprenis ankaŭ la funkcion de UEA-delegito. La nova rondeto akceptu niajn sincerajn bondezirojn!

Gottwaldov-Zlín: la rondeto vigle laboras. Dum ĉiu kunveno estas perfektiga kurso, mallongaj prelegoj el la vivo de L. L. Zamenhof aŭ el la movado. Nova adreso de la estro: s-ano Jiří Rozkydálék,, Obeciny 3903, Gottwaldov-Zlín.

Haviřov: Post sukcesa ekspozicio aliĝis 20 interesuloj en la kurson, kiun gvidas s-ano Oldřich Schwetter.

Hořice v Podkrkonoší: proksimume 15 novinteresuloj sub gvido de s-ano Jaroslav Drbohlav intencas fondi interesrondeton en la kadro de uzina klubo.

Jakartovice:

Kvankam la vilaĝo en distrikto Opava nombras nur 450 da loĝantoj, oni sukcesis fondi post antaŭa propagando E-kurson por komencantoj. La kurson partoprenas 10 gelernantoj de mezlernejo kaj 5 civitanoj.

Jihlava:

Kursoj kun 45 partoprenantoj. La 21-an de februaro, prelegon de s-ano J. Vítek, vizitis 300 ĉeestantoj. La klubo atingis jam pli ol cent membrojn.

Karlovy Vary:

s-anino Škrvnová-Nyklová gvidas kursn por 12 interesuloj. La 6-an de dec. Nikolaa vespereto kun pli ol 30 partoprenintoj.

Litvínov:

Laŭ la raporto de s-ano Uhlík kurso finis la 10.1. kun kvar gesamideanoj, kiuj daŭrigas la studadon kaj aliĝis al UEA.

Most:

Kurso kun 12 partoprenantoj en oficejo de Kovoslužba. La grupo reekzistas kaj ĝia situacio pliboniĝis. La grupo denove petas alsendon de Heroldo.

Obořiště:

Ekde novembro kurso por 12 infanoj, gvidas s-ano Karel Kraft, kiu aparte instruas 4 infanojn kaj 3 plenkreskulojn. Ĉiuj partoprenantoj preparas sin por somera tendaro apud Stachy.

Olomouc:

Esp. klubo aranĝis por sia membraro kaj por membroj de Esp. kluboj el regionoj Ostrava kaj Olomouc Popolan universitaton (15.-20.1.), kies lektoroj estis Stan. Římský, Dro Vlad. Mohapl, Miloš Rudolf, Josef Vašek kaj Jiří Kořínek. La 20.1. tradicia Laborkonferenco kun 122 ĉeestintaj delegitoj de ambaŭ regionoj kaj gastoj el tuta respubliko. Regiona komitato de Sindikata Asocio delegis k-don Adler, kiu post mallonga salut-referato transdonis en la manojn de ĝenerala sekretario de TKKE s-ano Miloš Rudolf kaj prezidanto de EK s-ano Dro Vlad. Mohapl VERDAN STANDARDON, donacon de Regiona komitato de Sindikata Asocio. La standardo estas destinita por TKKE kaj deponita en Olomouc ĝis la Tutŝtata Esperanto-konferenco. En la nomo de Uzina komitato alkroĉis sur la standardon k-do Žák rubandon.

Praha-ek-1957-46-15

BULTENO PRAHA 46 1957

- 15 -

Post la solena ceremonio, kiun la ĉeestintoj salutis per „La Espero“ sekvis referato de la prezidanto de TKKE s-ano Josef Vítek pri la nuntempa situacio de la movado en la mondo kaj en ĈSR. Sekvis referatoj de la prezidanto de Slovaka sekcio de TKKE s-ano E. V. Tvarožek kaj de UEA-delegito Vlad. Slaný. En diskuto partoprenis pluraj gesamideanoj. Laborkonferenco vere modela finis je la 14-a horo. RAPORTO PRI LABORKUNSIDO DE TKKE (20. 1. 1957) EN OLOMOUC.

Sub prezil de s-ano Josef Vítek okazis la laborkunsido de TKKE-estraro, kiun ĉeestis: Josef Vítek, Ed. V. Tvarožek, Ing. Štef. Veselý, Dro Ľud. Izák, Dro Vlad. Mohapl, F. Matušová, Fr. Lička, J. Kuzník, D. Kočvara, J. Kořínek, J. Vondroušek, J. Kožený, M. Rudolf, Vl. Slaný kaj gastoj. Filia laborkunsido de TKKE-estraro okazis en Praha la 23. 1. 1957 kun sama programo kaj partopreno de jenaj komitatanoj: Josef Vítek, Jar. Šustr, Rud. Burda, J. Čambál, Dro Tomáš Pumpr, Jar. Mařík, Ant. Slanina kaj gastoj.

Programpunktoj:

1. laborplano por la jaro 1957 – referanto s-ano Vítek
2. la 42-a UK en Marseille.

Ad 1.

s-ano Vítek raportis pri la pasintjara laboro, kiu kvankam ne povis okazi la Tutŝtata konferenco, estis sukcesa. En la jaro 1957 TKKE daŭrigos sian laboron surbaze de sperte el la pasinta jaro kaj tuj, kiam la kompetentaj lokoj acidos pri estonta organizacio, estos fiksita la dato de la Tutŝtata konferenco, kies loko restas Olomouc.

Ad 2.

TKKE-estraro decids peti E-organizaonjn en Sovet-Unio, Pollando, Ĉinio, Vietnamio, Hungarujo, Bulgarujo, Rumanujo kaj en Jugoslavio, ke ili sciigu, ĉu ili mem aŭ iliaj registaroj aŭ kulturaj instancoj sendos Esp. delegitaron. Estus dezirinda, ke ĉiuj delegacioj, kiuj traveturos Praha antaŭ la UK pridiskutus demandojn de la movado en popoldemokratiaj landoj ktp. Post la respondoj TKKE tuj ekkontaktos kun la ministerio per instruado kaj kulturo pri elsendo de oficiala delegitaro. Kiel delegitoj por la UK estis elektitaj: s-anoj Ed. V. Tvarožek, s-ano M. Rudolf, s-ano J. Kožený kaj unu reprezentanto de la Junularo, nomita de la Junularo.

Opava:

Kurson vizitas 25 interesuloj, gvidas s-ano Jar. Kuzník. Opava modele preparis Silvestran vespereton, komune travivitan kun la ostravanoj.

Ostrava-Junularo:

VŽKG-malnova jaro finita per parolado pri atom-kaj hidrogenbomboj kaj ĝiaj efikoj. Prezenti kaj per japanaj originalaj lumbildoj akompanis ĝin s-ano Karel Janouš (Fochova 2, Ostrava). Interesa parolado vekis ĉe aŭskultantoj profundan emocion. Ni rekomendas organizi similajn paroladojn por vasta publiko. Interkonsenta pri tio kun s-ano Janouš, kiu en parolado mencias ankaŭ Esperanton. – Kursoj progresas laŭ A-B-C sistemo. Meze de februaro ekzameno de ĉiuj kursanoj kun bona rezulto. Nova kurso startis la 20-an de februaro surbaze de ĉiufaka ekspozicio de la Uzina klubo, kiu havis ankaŭ tre altiran verdan anguleton.

Ostrava (Uzina klubo de tramistoj): Komitato organizis la 10-an de decembro kunvenon de ĉiuj rondetoj en Ostrava. Bela programo, partopreno 50 gesamideanoj. Similaj kunvenoj estos ĉiun kvaronjaron. Nova kursopor komencantoj startis en februaro.

Ostrava-Hrabůvka:

OUPZ 11 – kurso progresas, lernantoj jam vikle korespondas. 20 gekursanojn gvidas s. Kočvara. OUPZ 10 – 10 lernantoj studas la lingvon sub gvido de s-ano Josef Šlachta.

Ostrava-Hulváky:

Kurso kun 20 gekursanoj sukcese progresas sub gvido de s-ano Vladimír Slaný.

Praha-ek-1957-46-16

BULTENO PRAHA 46 1957

- 16 -

Ostrava-Vítkovice:

Du mezlernejoj (Místecká str. kaj Šalounova str.) aranĝas kursojn po 15 lernantojn, instruas s-ano Vlad. Slaný. Post prelego de s-ano Vítek venis lernejdirektoroj peti pri lerneja esperanto-rondeto.

Ostrava-Zábřeh:

Honore al la datreveno de la naskiĝtao de J. A. Komenský eldonis lokaj esperantistoj fotografaĵon de Esperanto-monumento inaŭgurita la 11-an de majo 1952 helpe de Kleriga societo, fako de esperantistoj „Komenský“. Vendeblo po Kčs 1 ĉe s-ano Frant. Lička, Březí 12, Ostrava-Zábřeh.

Pardubice:

Lokaj esperantistoj intencas aranĝi prelefojn de J. Vítek por la publiko.

Perštejn:

s-ano Jan Kafka intencas gvidi kurson en apuda Ostrov

Písek:

Esp. rondeto havis sian konferencon la 4. 3. dum kiu s-ano Vítek donis la bildon pri la movado enlande kaj en la mondo. Sub gvidado de s-ano Libor Křivánek komencitaj organizaj laboruj por somera tendaro de esp. junularo apud Stachy.

Poděbrady:

Laŭ ampleksa raporto de rondeta sekretario s-ano J. Chvosta la rondeto vigle laboris dum la pasintjaro. Ni nur mencias: komence de la jaro 12 – fine 27 anoj, kiuj regule kunvenadis 43-foje ĉiuĵaŭde en la klubejo (kleriga domo, Jiřího 41. Tri kursoj por komencantoj, finsudis 30 personoj. Laborkunvenon (3.6.) partoprenis 66 gesamideanoj el pluraj lokoj. Rondeto aranĝis en Poděbrady 6 plene elvenditajn kaj en Libice n. Cidlinou 3 prelegojn de J. Vítek. Por japana libroeldonejo HEJBONSYA la rondeto tradukis memstare 59 laborojn de metilernantoj kaj krome 50 netradukitajn sendis al EK Praha. Al Sovetio senditaj 10 insingnoj, al UEA aliĝis 5 membroj. Artikoloj pri laboro de la rondeto aperis en Učitelské noviny kaj en Lidová demokracie. La 28. 1. Okaze de finigo de kursopor komencantoj aranĝita vespero „Pri la vivo de Antonín Dvořák“. Prelegis kaj lumbildojn projekciis s-ano Fr. Tuch el Hradec Králové. De januaro estas en fluo progresiga kurso kun 18 partoprenantoj. Instruas s-ano J. Chvosta, faka instruisto laŭ plena gramatiko. Ĉe la 11jara mezlernejo fondita interesrondeto, kiun gvidas s-anino Sekotová.

Praha:

Ĉiusemajnaj kunvenoj de la junularo estas regulaj. Kvar membroj transprenis la ĉefan redaktadon de la centra Junulara organo TAGIĜO (ges-anoj J. Mařík, S. Zdeníková, Vl. Novobilský kaj Vl. Novotný). La administracio kaj presado restis en Opava. Kursoj daŭras. Krom kvar kursoj en la kadro de Kleriga kunularo, s-ano Novotný gvidas du kursojn por blinduloj (18 interesuloj), 1 kurson por vidantoj (5 pers.) kaj alian kurson por blinduloj gvidas s-ano Vuk Echtner.

Prostřední Bludovice:

Ankaŭ tie ĉi 20 infanojn instruas s-ano Schwetter laŭ la deziro de la lernejspektoro kaj direktorko, kiujn ravis brila sukceso de internacia gymnastika konkurso, pri kiu ni raportis en nia decembra numero.

Strakonice:

Finita kurso kun 25 kursanoj. Rondo vigle daŭrigas en siaj semajnaj programoj, kiuj celas progresigon de la anoj. En la propaganda laboro tre efike sepiis la vojaĝprelegoj de J. Vítek.

Žďár nad Sázavou: du kursoj. Grupo aranĝis sukcesan ekspozicion (660 vizitintoj) kaj vesperon de Zamenhof (40 ĉeest.). Aranĝota prelego de J. Vítek.

Žilina:

Esperantista rondeto „ESPERO“ de reg. Kulturdomo aranĝos esp. ekspozicion. Elektita rondeta estraro: prez. Miro Závodský, sekretario Miro Piják, kasistino Gaboriková, kulturpropagadisto Štefan Závodský, kiu zorgas spciale pri esp. fenestretoj. Komence de februaro finis la unua kurso por komencantoj kaj tuj sekvis tiu por progresintoj, kiun gvidas s-ano Miro Závodský. Krom tio malfermita dua kurso por komencantoj (15 interesuloj), kiun gvidas s-ano Rovay. Bela afiŝeto propagandis tiun ĉi kurson.

- - -

ALDONAJ GRAVAJ SCIIGOJ: HEROLDO DE ESPERANTO.

Ĉar la nombro de la numeroj, pri kiuj ni disponas ne estas pli granda ol pasintjare, ni ne povas bedaŭrinde akcepti abonpaĝojn de pliaj interesuloj. Male, 15 numeroj, je kiuj ni havas nunjare malpli, kaŭzas, ke ni devis al sama nombro de pasintjaraj legantoj provizore ĉesigi la liveradon. Ili afable pardonu. Laŭ la informo de s-ano Jung, tamen ĉijare la nombro de Herold-anoj en ĈSR iam altiĝos. Tiuj, por kiuj eksterlandaj amikoj pogas abonkostojn ricevados la gazeton direkte de la eldonejo. Vi, kiuj ricevis niajn unuajn numerojn de Heroldo, sendu al ni abonpagon Kĉs 40 per la pagilo, kiun ni almetis al dua numero. Se estas inter vi iu, kiu povas rezigni je Heroldo, ekz. pro tio, ke vi ricevas ĝin direkte aŭ havas eblecon legi ĝin ĉe via amiko aŭ en Klubo, resendu al ni tuj la ekzemplerojn de ni ricevataj, por ke ni povu kontentigi iun el multaj petantoj. Estas ankaŭ aro da gesamideanoj, kiuj sen la interkonsento kun ni sendis al ni diversajn sumojn kiel abonon al HDE. Temis plejparte pri tute novaj interesuloj, kiuj preferis pagi tre frue por garantii al si ricevadon de ŝatata Heroldo. Ni tre bedaŭras, ke ni ne povas plenumi ilian deziron. La sendita mono atendas nun klarigon por kia celo ni uzu ĝin aŭ ĉu ni ĝin resetu.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO:

Centra oficejo en Rotterdam kaj Teritoria oficejo en Praha ricevas multajn reklamaciojn el ĈSR pro nericevo de unua numero de revuo Esperanto. Ĉar intertempe jam alvenis la dua numero, kiun ĉiu regule ricevis, ni supozas, ke la unua numero ne estis allasita en ĈSR. Ŝustr.

NUNTEMPA BULGARIO:

Malgranda nombro ankoraŭ abonpagebla. Prezo Kĉs 7,30. Pagu al Jaroslav Ŝustr, Dlouhá 10, Praha 1.

EL LA ARĤIVO DE LA REDAKCIO:

B. Toll, Leningrad, USSR: Mi varmege dankas vin por via bonega Bulteno. Mi ne dubas, ke ĉiuj baroj estas forigitaj de la esp. vojo al paca harmonio...

Raymond Schwartz, Parizo: Korajn dankojn pro la Bulteno, salutojn kaj bondezirojn por la Nova jaro al ĉiuj amikoj...

J. Vaughan, dumviva membro de UEA N. Borneo: Elkoran dankon por via bonega Bulteno, kiu regule min atingas. Gratulon kaj elkoran samideanan bondeziron al vi ĉiuj...

Lercan O hUiginn, Dublin, Irlando: Mi dankas vin pro gazeto kaj sendas broŝuron Irlando...

Th. Finnbjarnarson, Islando: Koran dankon por sendado de via Bulteno, kiun mi regule ricevas kaj korajn novjarsalutojn al la s-anoj kun la espero pri progreso de Esperanto en via lando kiel ankaŭ ĉie...

Internacia Fako de Ĉina Esperanto-Ligo Peking: Ni ricevis la senditajn 10 ekzemplerojn de via ŝatata Bulteno kun sinceraj dankoj...

(Daŭrigo)

DONACIOJ, por kiuj ni sincere dankas: J. Juřička, St. Hrozenkov 6, J. Skopalík Brno 25, J. Ballay Brno 7, Fr. Bis Praha 11, M. Šiková Praha 2, Ing. J. Kochman Praha 100, M. Uzlová Horažďovice 21, L. Komzáková Tábor 4, L. Klegerová Velký Šenov 6, J. Hůda Jihlava 10, J. Beneš Jihlava 5, Ing. L. Krajč Tábora 10, St. Loskot Vys. Mýto 5, M. Novák Bráník 8, J. Radounský Borek 3, Al. Zedník Modřany 30, Fr. Pytloun Poděbrady 50, Kroužek esperantistů Hranice 24, Mil. Novák Bráník 6, J. Skopalík Brno 20, St. Loskot Vys. Mýto 5, L. Zaoral Holice u Olomouce 15, M. Večeřová Praha 6, Vl. Košler 10, M. Adamcová Brno 10, Odon Horák Čes. Skalice 10, T. M. Bohun N. Paka 6, Bl. Štefek Rybná n. Zd. 2, J. Vrkoslav Praha 6, M. Novák Bráník 4, J. Ev. Slávek, Týn n. Vlt. 51, ROH správa ostravské dráhy Olomouc 36, J. Peter Náchod 6, I. Severa, Praha 11, St. Štěpánek Netolice 4, K. Zipser Stonava 15, H. Chocholková Praha 6, A. Strejce Praha 6, L. Jasanská Praha 6, J. Zemek Rumburk 11, V. Zemanová Libnič 26, J. Kasal

Přibyslav 6, PhMr J. Jordán Ružomberok 6, M. Žahourková Polička 10, Jan Filip Chleny n. O. 6, Št. Havlenová Linhartice 26, P. Bartulec Stonava 16, Esp. rondeto MEZ Náchod 24, Ing. J. Řebíček Havl. Brod 20, E. Niebeuerová Potštejn 20, H. Franěk Čejč 6, Fr. Pytloun Poděbrady 16, E. Benda Tanvald 20, V. Čečelín Praha 6, D. Kostelný Prakovce 20, M. Adamcová Brno 10, 70, P. A. Macek Mikulov 10, M. Jíra Jablonec n. N. 16, KDO Liberec 12, J. Muron Frýdek 15, J. Lička K. Vary 16, O. Ungerová Neratovice 30, J. John Ostroměř 6, V. Špůr Doksy 25, J. Filip Chleny n. O. 10, J. Pavlacký Veselí n. Mor. 16, Jar. Bílý Praha 11.

(Daūrigo)

KORESPONDI DEZIRAS:

BULGARUJO:

Esper.grupo en „Závod za Saerajenia i instalacij“, Lomsko Šoce 6, Sofia.

Juna elektro-inĝeniero, konstruisto de elektraĵ maŝinoj-pri specialaj problemoj kaj la pacmovado kun gekolegoj aŭ junaj gelaboristoj el sama branĉo: Inĝ. Hristo KUKUŜEV, ul. „Ŝiŝman“ No 11, Sofia.

ĈEĤOSLOVAKIO:

27-jara interesiĝanto pri kulturado de fruktarboj, floroj kaj ĝardenoj, muzikamanto deziras kontaktiĝi letere kaj interŝanĝi ankaŭ PI kĉl: Jaroslav DRBOHLAV, Vŝehrdova 997, HOŘICE v Podkrk.

Gazetojn esperantistajn kolektas kaj interŝanĝas bibliotekisto de la Klubo. Ekkontaktu kun s-ano Zdeněk Hršel, Na Špici 103, HRADEC KRÁLOVÉ II.

S-ano Ruda BENEŠ, ŽELEZNÝ BROD č. 142, 53-jara fraŭlo serĉas ĉeĥan korespondantinon, 35-40 jaran fraŭlinon. Posta geedziĝo dezirata.

K-do Vlastislav PINDROCH, Nová kolonia 195, PRAKOVCE, okr. Gelnica, deziras korespondi kĉl.

26-jara oficisto deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kĉl. s-ano L. ZAVADIL, Komenského 390, ŽĎÁR NAD SÁZAVOU.

Korespondi kaj interŝanĝi PM kĉl. deziras 24-jara fraŭlo s-ano František RYŠAVÝ, oficisto, Trhárny n. p., IVANČICE u Brna.

29-jara fraŭlino kĉl.: s-anino A. STIEBLEROVÁ, Vojanova 9, JIHLAVA.

ĈINIO:

HSU CHUNG-MU 37 Lower Jian Ying Lane, HANGCHOW, Chekiang, 21-jara interesiĝas pri PM, literaturo, muziko, fotografko, PI.

GERMANIO:

Giso BROSCHE, Postweg 87, PIRNA/ELBE, DDR.

HUNGARUJO:

kun pedagogoj el ĈSR 28-jara profesoro laboranta en la Hungara Lernolibro-eldonejo: s-ano Otto VÁG, Lágynányosi utca 12.f.3. BUDAPEST.

JAPANUJO:

s-ano Toshiyuki NAKAHARA, 4633-5 Umimachi, Kasuyagun, HUKUOKAKEN.

s-ano Yoshiaki TURUTA, Hukuoka Syogyo Koto Gakko, Katakasu, HUKUOKASI.

s-ano Humio MATUBARA, 2985 Yamaga, Chikusinomachi, Chkusigun, HUKUOKAKEN.

POLLANDO:

MICHALKIEWICZ Stanislaw, PSM Dzierżažno, p. Kartuzy, woj. Gdańsk.

UKLEJA Edmund (16-jara) Kartuzka 75B.m.9., Gdańsk.

SZYMANSKA Krystyna (16-jara) Sukiennicza 5/1, KALISZ.

JANIAK IRENA (16-jara) Majkowska 2/20, KALISZ.

SOVETUNIO:

Lektoro de biologio de Riga pedagogia Instituto pri botaniko kaj interŝanĝi literaturon: Alfons PITERANS, RIGA, Láĉpléša iela 76-10

Studentino de Latva ŝtata universitato, filologia fako, 21-jara frekv. de kurso por esp. geinstruistoj
Intel.literaturon, PI kĉl.: Rúta ÁBELE, Gorkija iela 69-24, RIGA.

Samgrada kaj samaĝa studento kun samaj interesoj: Richards KALVÁNS, RIGA – 37, poste restante.

Studento de Riga pedagogia instituto (fiziko-matem.) 21-jara sportisto pri muziko per L kaj PI: Andris
PAEGLITIS, Benes ielá 4-6, RIGA-7.

Studentino de Latva ŝt. universitato, filolog. fako, 22-jara, estonta esp. instruistino interŝ. literaturon
kaj PI: Pita BĚLINA, P. Stučkos ielá 55-19, RIGA.

BULTENO, informilo de Esperantista klubo ĉe OB2 en Praha, aperas laŭbezone.

Respondeca redaktoro: Josef Vítek, Jungmannova 24, Praha II, tel. 238323.

Prezidanto de la Klubo: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I, tel. 63464.